

NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: esperantobilbao.tk

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/OKTOBRO 2012

Nro. 92 (3/12)



www.esperanto.net

Esperanto-Grupo

Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO



Nacia Loterio N° 90.387

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2012.

4,00 eŭroj
(MON-DONACO: + 1,00 €)

GRUPO ESPERANTISTA
0009 Barrencalle Barrena, 7-1.º
48005 - BILBAO

Servalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, ballorik gabea

Ya se puede comprar la lotería de Navidad en nuestro Grupo. Este año, el número termina por las dos últimas cifras (87) del año de aparición de la primera gramática en Esperanto (1887). A ver si esto nos da suerte.

Igual que el año pasado, cada papeleta se vende por 5,00 €, de los que se juegan 4,00 € de lotería y 1,00 € queda como donativo al Grupo Esperantista de Bilbao.

Cualquier ayuda para la venta de las papeletas será bien recibida.

Ĝenerala kunveno. Nova estraro.

Kiel anoncite, la 18-an de majo okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de la Grupo. Krom la kutima aprobo de la spezoekontoj, oni nomumis novan estraron:

Prezidanto:	Francisco de la Hoz Méndez.
Vicprezidanto:	Sabin Orueta Mendia.
Sekretario:	Jesús M. García Iturrioz.
Kasistino:	Iciar Arteche Urrutia.
Voĉdonantoj:	Francisco López López. José L. Bringas Tellechea. Eduardo Larrouy López.

Komuna tagmanĝo.

La 19-an de majo, por celebri la datrevenon de la fondiĝo de nia E-Grupo, oni organizis komunan manĝon en restoracio de Portugalete. Entute, 8 homoj kuniĝis en ege agrabla etoso.



Nova adreso de la TTT-ejo de la Grupo.

Nia antaŭa adreso (esperantobi.tk) estis forŝtelita de iu retrabisto, do nia senlaca amiko Pako translokigis la enhavojn al nova adreso: **esperantobilbao.tk**. Vizitu ĝin ĉar havas interesajn informojn pri nia E-Grupo.

La vendredojn, novaj kursoj.

La vendredon 19-an de oktobro, ekde la 19,30 h., komencos novaj kursoj: unu, elementa kaj, alia, paroliga, kies celo estas akiri iom pli da flueco kaj vortstoko por tiuj kiuj jam ekkonas la lingvon. Tamen, oni ne postulos vastajn lingvosciojn. Ni atendas vin!.

Jam funkcias la lifto.



Kiam ni vizitis la Grupejon la vendredon 15-an de junio, estis agrabla surprizo:

Ni povis unuafoje supreniri ĝis nia etaĝo per la nova lifto.

Jen alia kialo por viziti nian sidejon.

Desde el 15 de Junio, funciona el nuevo ascensor instalado en la sede del Grupo. Un motivo más para hacer una visita.

Dua pago de la obligacioj.

La 1-an de junio, ĉiu aĉetanto de obligacioj de la Grupo por pagi la novan lifton, ricevis la duan pagon, t.e., 20% de la mono pruntita al nia asocio. Koran dankon al tiuj, kiuj tiel malavare helpis al nia pluvivado.

La Prezidanto de HEF vizitas nian klubejon.

La 27-an de septembro, pro profesiaj kialoj, la prezidanto de Hispana E-Federacio venis en Bilbaon. Tial, nia amiko Tonjo del Barrio, profitis la okazon por longe kunveni kun kelkaj el ni en la sidejo de la Grupo. Post fruktodona interŝanĝo de opinioj, ni ĉiuj kune bierumis en apuga drinkejo de la malnova parto de la urbo.



La prezidanto de HEF staras, en la centro de la foto, ĉirkaŭata de bilbaoaj esperantistoj.

SOMERAJ VOJAĜOJ



Niaj samgrupanoj, Iciar kaj Jesús, tostas kun Pedro Garrote (Valadolido) kaj Angel Arquillos (Malago) dum la 79-a kongreso de Itala E-Federacio, okazinta en Mazara del Vallo, E-urbo de Sicilio.

KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

(Rigardu: <http://www.eventoj.hu/>)

6-13 okt. 2012. 20a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Tarragona). Inf.: luis_serrano@ya.com

3-5 majo 2013. 72-a Hispana Kongreso. Zaragoza. Informejo: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso>

julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando.

28 jul/04 aŭg 2013. SAT-kongreso. Madrido. <http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html>

03-10 aŭg. 2013. 80-a kongreso de Itala E-Federacio. Sanremo-Castelaro. <http://kongreso.esperanto.it>

27 dec/3 jan. 29-a Internacia Festivalo en Dortmund, Germanio. Kadra temo: Komputilo kaj interreto. HDP@internacia-festivalo.de

Julio 2014. 99-a Universala kongreso. Bonaero (Argentino).



Nova E-Grupo.

Aperis nova Esperanto - Grupo: La Grupo Esperanto - Albacete "Bonifacio Sotos Ochando" (EA - BSO). Informe, "ea" estas tre tipa esprimo en pluraj lokoj en La Manĉo. Ĝi estas kvazaŭ "nu,..." (plejofte en respondo).

Bonifacio Sotos Ochando skizis gramatikon pri Universala Lingvo en 1851 (36 jaroj antaŭ la publikigo de la "Unua Libro" pri Esperanto).

La grupo estas provinca kaj apartenas volonte al EMAs kaj, do, al HEF. Estus granda ĝojo por ni kontakti kaj kunlabori kun aliaj grupoj kaj asocioj pri Esperanto.

Oni povas kontakti kun la grupo per la jenaj iloj:

Tuenti: serĉante " Esperanto Albacete B. Sotos Ochando"

Facebook: <http://www.facebook.com/esperantoAB>

Twitter: [@EsperantoAB](http://www.twitter.com/EsperantoAB)

Nia blogo estas: <http://esperantoalbacete.blogspot.com>

(Jesús García Cano. 20-06-2012)

Lanti tute pravis.

Tre konata estas la anekdoto laŭ kiu nia karmemora Lanti ĉagrenadis la nevon de sia kor-amikino, George Orwell, kiu mondfamiĝis kiel eminenta verkisto.

Orwell ne sciis eĉ unu vorton en Esperanto, sed Lanti ne konsentis uzi dum lia restado ĉe sia hejmo uzi alian lingvon ol Esperanto: unuvorte, li ne konsentis krokodiladon.

Ĉu ĉi anekdoto ne estus aplikebla al nia kara forumo, kiu pro diversaj cirkonstancoj estas lastatempe invadita de miloj da literoj ñññññññññññ ?

(Darío Rodríguez. SATEH-Forumo. 07-07-2012)

« Boletín » kaj retaj forumoj.

Venontaj numeroj de "Boletín" estos ĉefredaktataj de nia vicprezidanto Angel Arquillos <angelarquillos@gmail.com>.

Samtempe, ni deziras denove kuraĝigi vin partopreni en la vivo de la asocio, pere de la retaj forumoj mastrumataj de HEF: la listo HEF-anaro taŭgas por ĉiuj informoj kaj diskutoj rekte ligitaj al HEF; se vi ankoraŭ ne estas membro, vi povas aliĝi sendante mesaĝon al hcf-anaro-subscribe@yahoogroups.com. La listo HEFaktivado taŭgas por kunordigi agadojn rilatajn al nia movado kaj asocio. Eblas aliĝi per mesaĝo al hcfaktivado-subscribe@yahoogroups.com

Alie, la estraro ricevis la sugeston ke individuaj membroj de HEF povu disponi je retadreso finiĝanta per @esperanto.es. Ni esploras la teknikajn kaj organizajn eblecojn per tio, sed ni ŝatus koni la realan deziron pri tio, kaj ni petas ke, kaze ke vi interesiĝas pri tiu solvo, bv. sendi vian peton al hcf@esperanto.es. Ni memorigas ke kolektivaj membroj de HEF ja havas tiun eblecon jam, kaj se via grupo deziras uzi adreson tiel belan, bv. kontakti nin por koni la praktikajn detalojn.

(José Antonio del Barrio, HEF-Prezidanto. 22/09/2012).

E-o en teknika komitato de ISO en Madrido.

Dum la lasta semajno de junio 2012 okazis en Madrido kunsido de tutmonda Teknika Komitato pri terminologio kaj aliaj lingvaj kaj enhavaj rimedoj de la Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO), kiu okupiĝas pri diversaj temoj rilate al lingvoj, ĉefe terminologio, sed ankaŭ interalie tradukado kaj interpretado. Tiu teknika komitato (formale nomita ISO/TC 37) konsistas el dudeko da laborgrupoj, kiuj siaflanke okupiĝas pri konkretaj projektoj.

Universala Esperanto-Asocio kiel kunlaboranta organizaĵo estis invitita aktive partopreni. Tial dum tiu semajno vizitis Madridon la komisiito pri terminologio de UEA, Melanie Maradan, kiu partoprenis dum la sesioj de la komitato. Ŝi ankaŭ partoprenis en la jara kunveno de Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio vespere, la 26-an de junio. UEA fariĝis membro de Infoterm en 2011. Fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj Aŭstra Normiga Instituto (ASI), Infoterm celas interŝanĝi informojn, subteni kaj kunagadi por projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp, ĉefe en la kampo de terminologio.

(« Nia Voĉo ». *Organo de Madrida E-Liceo*). Julio/aŭgusto 2012)

Iñaki Gabilondo en ... Esperanto.

Kurioza kanalo kun sutekstigitaj televidaj prezentoj de Iñaki Gabilondo:

<http://www.youtube.com/user/jschroeder222/videos?flow=grid&view=0>

(*Kantabria E-Asocio (el la listo de SATeH)*, 21/09/2012)

GRAMATIKAĴOJ

PRI PREPOZICIO ANTAŬ INFINITIVO.

Ĉiu prepozicio, laŭ sia logika esenco, povas esti uzata nur antaŭ *substantivo*. Sekve se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbosenca vorto la formon de substantivo; ekzemple: anstataŭ "kun saluti", "sen respondi" ni devas diri "kun saluto", "sen respondo".

Se la vortoj "por" kaj "anstataŭ" estas uzataj kun la infinitivo, ili tute ne prezentas ian escepton, sed la kaŭzo de tia uzado estas alia, nome: la vortoj "por" kaj "anstataŭ", uzataj antaŭ infinitivo, havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de konjunkcio, kaj en tiuj okazoj la uzado de substantivo apud ili estas ne ebla; ekzemple, en la frazo "anstataŭ stari li sidas" ni ne povas anstataŭigi la formon "stari" per "staro", dum ĉe ĉiu alia prepozicio *pura* ni *ĉiam* povas uzi la verbosencan vorton en formo de substantivo (ekzemple, "sen ia diro" anstataŭ "sen ion diri").

Respondo 37 a, *La Revuo*, 1908, Majo

Do nur "por" kaj "anstataŭ" uzeblas antaŭ infinitivo, pro la kialoj montritaj de Zamenhof mem. Tamen mi devas aldoni, ke la uzo de la prepozicio "sen" antaŭ infinitivo jam tute enhejmiĝis en Esperanton. Ĉe neniu alia prepozicio mi konstatis tian enhejmiĝon (krom ĉe eraraj uzadoj, memevidente). Kompreneble nenio malhelpas, ke ni komencos senĝene uzadi prepoziciojn antaŭ infinitivoj - lingvo ja estas nura konvencio: se ni ĉiuj uzas kaj komprenas la saman konvencion, kio malhelpas? Tial mi diris, ke en -ĝishodiaŭa-Esperanto "pro diskuti" estas simple erara. Sed eble ĝuste tiun formon oni senĝene uzos post cent jaroj.

(*Francisco Javier Moleón*, 21/09/2012)

Naskiĝas la universitato de Esperanto.

Dank' al la longa, senpagita kaj profesia laboro de Profesoroj Ron Glossop el Usono kaj Federico Gobbo el Italujo, la Universitato de Esperanto ekestiĝas, kaj nun, per la prototiporetejo www.universitato.info videblas senpage kaj senvojaĝe. Kelkaj Esperantistoj povas ĝoji, ke ili nun povas lerni kaj studi, PER Esperanto, universitatajn temojn pri ne-esperantaj aferoj. Aliflanke, Ne-Esperantistoj nun devas almenaŭ agnoski, ke KOMPLETAJ, universitataj kursoj tute en Esperanto eblas kaj okazas en la jaro 2012.

Restas multe da laboro, kaj la sonkvalito kaj vidkvalito de la Universitato de Esperanto restas sub tiu de Yale, Berkely kaj Harvard, tamen ni Esperantistoj faris ĉion sen subvencioj dum en iliaj manoj estas dekmilionoj da dolaroj por antaŭenigi siajn «open course» projektojn en la angla lingvo.

Por vi kiuj emas studi universitatajn temojn, vi jam povas spekti proksimume 15 horojn de lecionoj el du kursoj (ĉu per Youtube, Ipernity, Vimeo). Post kelkaj monatoj, vi havos la tutajn kursojn, do proksimume 70 horojn de universitataj kursoj. Vi povas lerni pri Filozofio kaj Historio de la Informadiko, instruata de Profesoro Federico Gobbo el Italujo. Vi ankaŭ povas lerni pri la temo paco kaj milito, instruata de Profesoro Ron Glosop, en lia kurso nomata Alfronti Militon.

La Universitato de Esperanto baziĝas sur la nuntempaj modeloj de « Open Course Ware », kiel videblaj ĉe la Universitatoj de Yale oyc.yale.edu, kaj de Berkeley webcast.berkeley.edu. Iliaj kaj niaj kursoj estas kompletaj, kun ĉirkaŭ 40 horoj da lecionoj. Ili estas filmitaj kaj disponeblaj interrete sub la licenco Krea Komunaĵo. Niaj kursoj en Esperanto estas veraj, laŭ enhavo, kursoj , kiuj jam antaŭe instruiĝis nacilingve ĉe universitatoj en diversaj landoj.

Eble substrekindas la paradokso de la Universitato de Esperanto: ĝi ne estas pri Esperanto nek pri Esperantologio. La Universitato utiligas la Internacian Lingvon, sed ĝi utiligas ĝin por lerni kaj studi nur sciencajn kaj sciajn temojn kiel niaj universitatoj tiel faras tra la tuta mondo.

La celo kaj la misio de la Universitato de Esperanto estas kaj restos simpla: prezenti al Esperantistoj kaj al ne-Esperantistoj universitat-nivelajn kursojn EN, sed ne pri Esperanto, por ke Esperantistoj lernu kaj studu intelektajn temojn per Esperanto, kaj por ke ne-Esperantistoj sciu, ke nia lingvo utiligeblas por uzo ĉe universitata nivelo.

(Dennis Keefe. 12-08-2012)

Pola Parlamento celebros E-o 125-jara.

Post longa negocado kun la vicprezidanto de la pola senato, prof. Edmund Wittbrodt, la pola parlamento akceptis esti la sidejo de la festado de la Eŭropa Tago de Lingvoj la 26-an de septembro kun la temo 125-jariĝo de Esperanto.

(Etsuo Mijoshi. 06-07-2012)

FELIĈAN NASKIĜTAGON deziras la aŭtomarko MINI.

La aŭtomarko "Mini" deziras „Feliĉan naskiĝtagon!“ al Esperanto okaze de la 125-a datreveno de ties surmondiĝo. La prestiĝa aŭtoentrepreno BMW eldonis gazetaran komunikon pri tio krom la germana ankaŭ en Esperanto:

<https://www.press.bmwgroup.com/pressclub/p/de/download.html?textId=154803&textAttachmentId=189700> en elŝutebla pdf-formato.

Ekzistas interesa foto ankaŭ en la plurlingva gazetara komunikado de la fabriko BMW!

... Pro tio MINI deziras en plej esperanta Esperanto „Feliĉan naskiĝtagon!“ kaj ĉion bonan por la ventontaj 125 jaroj! ...

(Kantabra E-Asocio. 25-05-2012)

Germana partio uzas Esperanton.

Laŭ informo de Francesc Ibáñez i García en la kataluna E-forumo, la germana Pirata Partio uzas E-on: <http://wiki.piratenpartei.de/BE:Squads/Esperanto/2012-05-13>

Inter la e-aktivuloj de tiu partio troviĝas Chuck Smith, kreinto de la Esperanta Vikipedio. (http://eo.wikipedia.org/wiki/Chuck_Smith)

(Darío Rodríguez. 10-06-2012)

Kaj eĉ pli menciindas la esperantisto Martin Haase, kiu estas laŭ pluraj magazinoj eĉ la plej influa pirato en Germanio.

<http://www.liberafolio.org/2012/esperantisto-en-grava-rola-inter-germanaj-piratoj/>
(Istvan Ert)

Esperanta nomo por publikaj bicikloj en Varsovio.

Estraro de Publika Transportado en Varsovio malfermis konkurson por nomo, kiun havos sistemo de publikaj bicikloj en Varsovio. La unuanetapon transiris unu nomo en Esperanto: veturilo.

Hodiaŭ mi povas informi ke “Veturilo” nomiĝos la sistemo de urbaj bicikloj en Varsovio! La nomo gajnis en reta voĉdono. Detalajn informojn serĉu ĉi tie:

<http://pej.pl/2012/05/29/bicikla-veturilo-en-varsovio/>

(Łukasz Żebrowski. 29-05-2012)

Android, Google kaj Esperanto.

En "Planeta Red" oni mencias ke Google inkludis sian tradukilon en versio por Android. La artikolo mencias ke tiu tradukilo inkludas Esperanton. Krome, ĝi montras specimeno de traduko angla > esperanta kun retraduko esperanta > angla, kun perfekta rezulto: <http://planetared.com/2012/05/actualizacion-de-google-translate-para-android/>

Ankaŭ en "Android Ayuda" oni mencias la inkludon de Esperanto en la Android-versio de la Google-tradukilo:

<http://androidayuda.com/2012/05/31/el-traductor-de-google-se-renueva-por-completo/>

(Darío Rodríguez. 01-06-2012)